Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

32-a Jarkolekto * Marto 2018 * N-ro 108

ISSN 1576-0618



MACAEL

kie la Naturo naskis la blankan marmoron

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE
Vicente HERRERA COBO
Carlos SPINOLA

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
Andaluzia Etimologio 6
Lingva Angulo 11
Poezia Angulo 14
Turismi en *Macael* 16
Paĝoj pri nia Historio 19
Flamenko 25
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio 29
Krucvortenigmo 31
Humuro 34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Renkontiĝo de AEU-anoj en Malago.-

La pasintan 28-an de aprilo okazis ĉe la Lernejo pri Informadiko de la Universitato de Malago renkontiĝo de la Estraro kaj membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Inter la diversaj pritraktitaj temoj oni devas elstari la akcepton de la andaluzia asocio organizi tri konkresojn dum la monato majo de la venonta jaro 2019.



Temas pri la 21-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazonta samtempe al la 78-a Hispana Kongreso. Nur unu semajno poste nia asocio organizos la 71-an Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. Dum la renkontiĝo oni informis pri la demarŝoj jam ekigitaj por la sukcesa okazigo de la kongresoj. Tiel, oni trovis jam taŭgan kongresejon, la Dioceza Domo en Malago, kie ankaŭ estos eble resti kaj eĉ manĝi kontraŭ ne tro alta kosto. Do, la kongresanoj ne devos serĉi aliajn gastejojn tra la tuta urbo.

La okazigo de internacia esperanto-kongreso tiel grava, kiel tiu de la fervojistoj kie espereble ĉeestos preskaŭ 200 gekongresanoj, estos grava defio por nia asocio, kiu unuafoje en ĝia historio kuraĝiĝas organizi internacian kongreson, kvankam espereble ĝi estos nur la unua organizota de ni.

Sur nia revuo ni ofte informos pri la programo, gast-eblecoj kaj ekskursoj okazontaj dum ĉi tiuj kongresoj. Alie, jam estas eble aliĝi al ĉi tiuj renkontiĝoj sur la TTT-paĝo:

https://esperanto-andalucia.info/

Renkontiĝo de virtualaj lernantoj en Sevilo.-


La pasintan 24-an de junio okazis en kelkaj hispanaj urboj samtempe renkontiĝoj de virtualaj lernantoj de la internacia lingvo. Temas pri partoprenantoj en la kurso organizata de Duolingo, inter tiuj urboj troviĝis Sevilo.



La celo estis renkontigi tiujn homojn kiuj mem-lernas esperanton pere de komputilo aŭ poŝ-telefono, sed ĝis tiam preskaŭ neniam uzis la internacian lingvon en la praktiko. La renkontiĝo okazis en la Parko *María Luisa* kaj dum ĝi oni disdonis diplomojn al tiuj kiuj sukcese finis jam la kurson. Kompreneble oni profitis la renkonton por praktiki la lingvon, lernita sen fizika ĉeesto en kurso. La etoso estis tre alloga.

Nova Numero de *Jura Tribuno Internacia.-*

Nia asocio, kunlabore kun la Internacia Jurista Esperanto-Asocio, eldonas ĉiu-jare la revuon *Jura Tribuno Internacia.* Ĝi estis prezentata okaze de la asembleo de juristoj okazanta dum la Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono (Portugalio).



Tra siaj 76 paĝoj la revuo prezentas ĉi-jare artikolojn pri la 17-a jarcenta portugala juristo Serafim de Freitas, pri la jura situacio en Eŭropo de la eksterlandaj ne-plenaĝuloj ne akompanitaj, pri la ĵus surbendigita kurso pri Internacia Mar-Juro en Jutubo, ktp.

Se Vi interesiĝas aŭ rilatas al juraj medioj kaj Vi deziras ricevi la revuon, ne hezitu kontakti kun la Internacia Jurista Esperanto-Asocio ĉe esperanto-juro@ono.com

aeu
Andaluzia Esperanto -Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

ANDALUZIA ETIMOLOGIO

Alejandro Burgos Escalante. Teba (Malago)
José María Rodríguez. Kordovo

Oni eldiras ties nomojn ĉiutage, ili aperas sur ĉia-specaj dokumentoj, ni eĉ tradukis ilin en la internacian lingvon, tamen, ĉu vi iufoje demandis al vi mem kio signifas la nomoj de la andaluziaj provincoj? La etimologio estas la scienco pri la deveno kaj evoluo de la vortoj, kun la celo malkovri ĝian veran sencon kaj pli funde konatiĝi kun ĝi. Kompreneble, ne temas pri ekzakta scienco, do, oni studas la *eblan* originon kaj evoluon de la vortoj, tamen, estas tre interese koni kial la andaluziaj urboj kaj eĉ la nomo de nia lando mem, nomiĝas tiel. Ni vidu:



Monero trovita kie unue aperas la vorto: *AL-ANDALUS*
Jaro 716 p.K.

ANDALUCÍA:

La vorto *Andalucía* venas el la araba Al-Andalus. Tamen, multaj historiistoj argumentas, ke ĝi ricevis similan nomon antaŭ la araba invado. Tiel, oni diras, ke la nomo devenas de la Vandala Popolo, kiu inter la jaroj 410 kaj 418 p.K. eniris tra Andaluzio dum sia vojo en la nordon de Afriko. Tamen, oni devas rifuzi la pravecon de tiu teorio, pro la fakto, ke la vandaloj restis en Andaluzio nur dum tre malmultaj jaroj. Aliaj historiistoj asertas, ke la nomo devenas el iu germana lingvo, konkrete el la vorto *landolose* aŭ *landhlauts*, kies signifo estas "dividi ter-pecojn". Laŭ tiu teorio, kiam la gotoj okupis la iberan duoninsulon (5-a jarcento p.K.), ili dividis Andaluzion kaj atribuis ĝin al diversaj familioj, tamen neniun dokumenton oni trovis por pravigi tiun teorion.

Eble la plej certa teorio estas tiu asertanta, ke la nomo Al-Andalus uzata de la araboj, devenas el Atlantiko kaj ĉi tiu el la mistera regno *Atlantido*, kiu laŭdire troviĝus sud-okcidente en la nuntempa Andaluzio.

MÁLAGA:


La nomo de ĉi tiu provinco devenas el la fenica vorto *M'L'K'* aŭ *Malaka,* kies signifo estus "reĝo, reĝino, reĝi". Ŝajnas, ke la fenicoj starigis grandan templon en la ĵus fondita urbo (8-a jarcento a.K.) honore al la diino Astarto, ankaŭ konata kiel *"la reĝino"*, tio estas: *malaka*. La romianoj, post la fenicoj, uzis la nomon *Malaca.* La traduko en esperanton de la urbo estas "Malago", bazita sur la nuntempa nomo de la urbo.

SEVILLA:

La tarŝiŝoj nomis la lokon *Spal*, kies signifo estus *"ebenaĵo"*. La romianoj adaptis tiun nomon en la latinan lingvon kaj tiam la urbo estis ekkonata kiel *Hispalis*. Poste la gotoj uzis *Spalis.*

La araboj, dum la 8-a jarcento, ne ŝanĝis la nomon, ili nur adaptis ĝin en la araban lingvon, do la urbo nomiĝis *Ishbiliya*, de tie venas la nuntempa *Sevilla.*

En esperanto oni diras "Sevilo"-n, kvankam ankaŭ estgas uzata la formo "Seviljo", pli proksima al la hispanlingva prononco.



Idolo, jaro 2.100 a.K.
trovita apud Sevilo, la antikva *Spal*

HUELVA:

Grekoj nomis la urbon kiel *"Onoba"*, kvankam la origino de la vorto ne estas konata, kelkaj historiistoj asertas, ke la nomo devenas el la fenica *"'anáb"* (tero kie kreskas la vinberoj). La romianoj adaptis tiun nomon kiel *Onuba* aŭ *Onuba Aesturia*. Pro tio, ankoraŭ en la hispana lingvo la enloĝantoj de la urbo ricevas la nomon *"onubenses"*.

Onuba estis poste *On'ba,* el kiu aperis *Uenba* kaj poste *Uelba.* En esperanto oni sekvas la antikvan nomon, kies enloĝantoj ankoraŭ konservas, do, en la internacia lingvo la urbo kaj provinco nomiĝas Onubo.



Romia monero kun la teksto: *CORDVBA*

CÓRDOBA:

Kiam la romianoj fondis la urbon dum la 1-a jarcento a.K., ĝi ricevis la nomon *Colonia Patricia Corduba.* La unua mencio de setlejo, kie nun troviĝas la urbo, rilatas al fenica setlejo kun la nomo *Qorteba*, kies signifo estus "oliv-muelilo", kvankam aliaj historiistoj asertas, ke la nomo devenus de fenica *Qart-oba* (la monto de la rivero Oba - unua nomo de la rivero Gvadalkiviro en tiu lingvo).

Ekde la mezo de la 19-a jarcento la definitiva nomo de la urbo estis *Córdoba*, antaŭ tiu jarcento por skribi la nomon de la urbo oni uzis ankaŭ la litero V, tio estas: *Córdova.* En esperanto oni uzas ankaŭ tiu antikvan, kaj eble pli internacia formo, nomon, do esperantigita la ĉefurbo de la islama Al-Andaluso estas: Kordovo.

CÁDIZ:

Temas pri la plej antikva urbo en Andaluzio. Fondita de la fenicoj en la jaro 1.104 a.K., la urbo ricevis la nomon *Gadir,* kies signifo estus "kastelo, fortreso". La romianoj nomis ĝin *Gades* kaj la araboj *Qadis,*

tiu nomo poste fariĝis la aktuala Cádiz. En esperanto oni uzas la vorton Kadizo.

JAÉN:

La unua nomo de la urbo estis la fenica *Aurigi.* La romianoj simpligis la nomon per *Aurgi* kaj ankaŭ per ĉi tiu nomo estis konata de la gotoj. La araboj nomis la urbon kiel *Madinat-al-Yayyan,* supozeble ili uzis la nomon de romia vilao ekzistanta en la urbo, la *Villa Gaiena* (vilao de Gajo). El la arabo nomo *Yayyan* aperis la nuntempa Jaén, kiu en esperanto estas Jaeno, kvankam ofte ĝi aperas en nia lingvo ankaŭ kiel Ĥaeno.

GRANADA:

La araba urbo ricevis la nomon *Medina Garnata,* verŝajne la nomo devenas el *Gar-anat*, la monto de la pilgrimantoj. Tiu *Gar-anat* fine transformiĝis en Granada, kies símbolo estus la frukto granato, kun simila nomo al tiu de la urbo, tamen tute ne rilata se paroli pri la origino de la nomo. En esperanto la urbo ricevis la nomon Granado.

ALMERÍA:

La araboj fondis Almerion en la jaro 955 p.K. kiel defendilo de la najbara urbo kaj haveno Peĉino. Do, en la nuntempa Almerio oni starigis turon por defendi tiun alian havenon, tiel ĝi ricevis la nomon Al-miraya Bayyana, tio estas la turo kiu defendas Bayyanan (la nuntempa urbo Peĉino). La urbo kreskis ĉirkaŭ tiu turo, tiel la nomo fine estis Al-miraya (la defen-turo). El tiu vorto devenas la nuntempa Almería, kiu en esperanto estas Almerio.

Mi esperas, ke.. NE, ATENTU:

ni parolu pri alia urbo en Andaluzio:

GIBRALTAR:

En la antikvaj epokoj ĝi ricevis la nomon *Mons Calpe.* En la jaro 711 la araboj eniris en Andaluzion tra tiu urbo, tiel ĝi ricevis la nomon Yabal Tariq, la monto de Tarik, omaĝe al la ĝeneralo kiu ekinvadis la duoninsulon pere de Ĝibraltaro. El tiu Yabal Tariq devenis Gibraltar, kiu en esperanto estas Ĝibraltaro.

Ni esperas, ke ĉio plaĉu al vi !

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:


- **BANKIA**
  IBAN ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2018

Lingva Angulo

La Prepozicio LAŬ



LAŬ estas prepozicio kiu en la uzado ne okazigas problemojn al hispanlingvano. Ofte ĝi estas tradukata kiel *SEGÚN*, tamen estus bona ideo pristudi iomete ĉi tiun vorton.

Kiel dirite unue, *laŭ* (tradukita kiel *según*) indikas konformecon, tio estas oni montras per ĉi tiu prepozicio ion al kio oni konformas. Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- La gelernantoj studis la lecionon laŭ la peto de la profesoro.
  Los estudiantes estudiaron la lección según (conforme a) la petición del profesor.

- Mi lernas novan lingvon laŭ ĵus eldonita libro-metodo.
  Aprendo una nueva lengua según (siguiendo) un método recién editado.

- Ŝi studis medicinon laŭ la ekzemplo de sia patrino.
  Ella estudió medicina según (por) el ejemplo de su madre.

Tio estas, pere de ĉi tiu uzo de la prepozicio *laŭ* oni faras ion konforme al alia afero, ankaŭ aperanta en la frazo. Ĝi eĉ povus esti komprenata kun la mala signifo de *kontraŭ*, ekzemple:

- Li vojaĝis en la Nordan Poluson dum la monato decembro laŭ la peto de sia amiko kaj kontraŭ la opinio de siaj gepatroj.
  El viajo al Polo Norte durante el mes de diciembre según la petición de su amigo y contra la opinión de sus padres.

Pere de dua signifo *laŭ* povas esti uzata por montri vojon. Ni vidu kelkajn ekzemplojn:

- Li vojaĝis el Sanlucar ĝis Sevilo laŭ la rivero Gvadalkiviro.
  El viajó desde Sanlucar a Sevilla a lo largo del río Guadalquivir.
- Ni veturis en Malagon laŭ la auto-ŝoseo A-7.
  Nosotros viajamos a Málaga a través de la autovía A-7.

Alia signifo de *laŭ* iel rilatas al direkto, sed ne temas pri sekvota vojo. Ni vidu:

- Razu vian barbon laŭ la haroj.
  Afeitate la barba siguiendo la dirección del vello.

Tio estas, sekvu la direkton de la haroj por razi vin.

Tria uzo de *laŭ* montras bazon por tio dirita en la frazo. Ekzemple:

- Lia patro estas lignaĵisto, laŭ sia profesio.
  Su padre es carpintero de profesión.

Laŭ eĉ povas ekigi subfrazon:

- Li vojaĝos en Amerikon venont-jare, laŭ li mem deklaris hieraŭ nokte.
  Él viajará a América el año que viene, según declaró él mismo ayer por la noche.

Vort-farado per *LAŬ*

Kiel dirite, *laŭ* estas prepozicio, tamen estas eble krei adverbon adiciante la literon *E:* *laŭe.*

- Vi devas agadi ĉiam laŭe.
  La traduko de ĉi tiu frazo en la hispana lingvo ne estas facila afero, povus esti pli malpli:
  Debes actuar siempre siguiendo un criterio.

Eĉ oni povas adicii ĝin al aliaj vortoj:

Laŭdire.... Tio esprimita de grupo, ne necese de iu aŭ alia homo. *Laŭdire = laŭ onidiraĵoj.*

- Laŭdire ili ĉesis esti gefianĉoj.
  Según se dice han dejado de ser novios.

Laŭlonge... laŭ la longo de io.

- Li loĝas en malproksima kvartalo kaj ĉiutage li devas piediri laŭlonge la ĉefan avenuon por iri en la laborejon.
  Él vive en un barrio alejado y cada día debe caminar a lo largo de la avenida principal para ir al trabajo.

Laŭvorte.... laŭ la (konkretaj uzataj) vortoj.

- La ĉef-ministro deklaris laŭvorte, ke li ne demisios.
  El primer ministro declaró textualmente que no dimitirá.

Laŭleĝa ... konforme al la leĝo.


- La subskribita kontrakto ne estas laŭleĝa.
  El contrato firmado no es conforme a la ley.

Laŭvice ... en serio unu post la alia.

- La gelernantoj laŭvice deklamis poeziojn.
  Los alumnos por turnos declamaron unas poesías.

Poezia Angulo

Pasintnumere ni jam ekhavigis la informon pri nova poemaro de nia malaga samideano Ángel Arquillos López. Li jam publikigis pliajn poem-librojn, kaj en esperanto kaj en la hispana. Ĉi-foje aperis "La Fontano de l'Sorto", kun poemoj verkitaj de Ángel Arquillos dum la tri lastaj jaroj.



Tra sesdeko da paĝoj la aŭtoro havigas al ni intiman universon de sencoj, pere de poemoj kiujn montras la vizion de Ángel pri ĉiuj aferoj, kvankam la oftaj temoj, jam ĉeestantaj sur aliaj libroj de la aŭtoro, aperas denove en ĉi tiu nova poemaro.

Kun la rajtigo de la aŭtoro ni publikigas nun kelkajn el ili:

Zigzage

Zigzage promenas la vivo
tra vojo senfina.
Ĝi pene daŭrigas piediron
kaj forte laciĝas.
Zigzaga la vojo ne estas
ĉar ĝi tute rektas,
sed homoj forestas!
kaj sole la vivo ĉeestas
sub malhelaj nuboj
forta vento ventas
kaj mia soleco
jam ne plu serenas.

Mi plenumis la promeson

Mi plenumis la promeson
reveni en nian hejmon,
sed en ĝi regas mistero
kun malagrabla atmosfero
kaj kun fermitaj fenestroj.
Mi plenumis la promeson
kaj kun timo mi konstatas
ke jam vi ne plu revenos...
Vi forflugis inter nuboj
al la senfina ĉielo,
kie loĝas senkorpuloj
spiritoj kaj anĝeloj.
Mi plenumis la promeson,
sed la pezo de la grundo
estas forta bariero
kaj mia korp' elĉerpita
ne plu trapasos la teron.


La Fontano de l'Sorto de *Ángel Arquillos López*
Eldonas: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
ISBN: 978-84930304-8-3
Prezo: 6 eŭroj.

Turismi en ... MACAEL (Almerio)

Meze de la provinco Almerio, ĉe la andaluzia Oriento, trovîgas urbo posedanta unu el la plej antikvaj naturaj riĉaj materialoj, la tiel nomata *blanka oro:* la marmoro. Tiel, ĉi tiu urbo Macael estas konata en la tuta mondo pro ties marmoraj ŝton-minoj, unue ekspluataj de la fenicoj, kiuj uzis tiun belegan blankan ŝtonon por siaj plej luksaj ŝton-ĉerkoj.

Tiel naskiĝis la urbo, piede de la marmoraj montoj, ĝuste sur loko nun konata kiel *"Macael Viejo"* (l'olda Macael). Dum la 10-a jarcento la islamanoj fondis tie urbon kaj el la tuta zono ili eltiris la ŝtonajn materialojn por konstrui la Alkazabon de Almerio, la plej belajn monumentojn en la granada Alhambro, la kordovan kalif-urbon Madinat Al-Zahara, ktp .

En la jaro 1489 la kastiliaj trupoj de la Katolikaj Gereĝoj konkeris la urbon. Sed en la jaro 1568 Macael, kaj la tuta sudorienta Andaluzio, ribeliĝis kontraŭ la kastilia reĝo, ĝi estis konata kiel la moriska ribelo (1568-1571). Post la nova konkero de la urbo fare de la kastilia armeo, oni forpelis la ribelemajn moriskojn en la nordon de Afriko kaj oni alvenigis 22 kristanajn familiojn ĉefe el Kastilio, Valencio kaj Murcio.



Blazono de MACAEL


Dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj la enloĝantaro kreskis, ĉefe dank'al la bezonoj pri marmoro de la hispanaj regnoj. Tiel, oni uzis marmoron de Macael por la konstruo de la Monaĥejo *El Escorial* apud Madrido, por la Reĝa Palaco en la hispana ĉefurbo kaj por la planko de multaj katedraloj, kiel tiu de Jaeno.

Dum la 19-a jarcento la procezo por eltiri kaj transporti la marmoron moderniĝis. Tiel, oni konstruis fervojon en la zono por faciligi la transporton de la materialo. Nuntempe Macael estas urbo kies ekonomio baziĝas sur la marmoro, la blanka oro, tiel ĝi estas la ĉefa ekonomia resurso por la nuntempa enloĝantaro, 6.000 homoj. Kvankam lastatempe, la turismo ankaŭ alportis novajn ekonomiajn rimedojn al la urbo.

Monumentoj

- Preĝejo de *Nuestra Señora del Rosario*

Starigita komence de la 17-a jarcento laŭ mudeĥara stilo. Ene de ĝi troviĝas belaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj.



- *La fontano de la leonoj*

La orIginala fontano de la leonoj, starigita meze de la granada Alhambro, estis konstruita el marmoro de Macael. Do, antaŭ kelkaj jaroj oni konstruis reproduktaĵon de tiu fama fontano kaj oni lokigis ĝin meze de urbo-centra placo.

- *Placo de la Konstitucio*

Troviĝas en tiu placo la antikva urbodomo kaj kelkaj nobelaj domoj.

Vizitinda loko ankaŭ estas la *Muzeo de la Marmoro de Macael*, ekigita en la jaro 2014 ĝi troviĝas apud la Preĝejo de *Nuestra Señora del Rosario*. Temas pri muzeo kie estas eble koni ĉiujn aspektojn pri la

marmoro, ekde la ŝtonaj minoj ĝis la kreo de arkitektura aŭ skulptaj artaĵoj.

Festoj

Honore al la Virgulino de la Rosario (la 7-a de Septembro) okazas tipa andaluzia foro.

Gastronomio

Dum vintro estas ofte trovi en la kuirejoj de Macael frititajn panerojn, akompanitaj de sekaj frititaj tomatoj, fiŝaĵoj kaj prapikoj. Ankaŭ oni ellaboras kuir-potaĵojn kun kukurboj kaj fenkoloj.

Estas ankaŭ tre fama la pastecĉo de Sankta Marko, temas pri pano kaj oleo kronigita de ovo, kiu devas esti frakasita, laŭ tradicie, sur la kapo de la plej distriĝema el la partoprenantoj en la manĝado.

Venont-numere TURISMI EN ....

HIGUERA DE LA SIERRA (Onubo)

Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn....


Gazeto Andaluzia estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, tamen ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: esperanto14@ono.com

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

José de Tapia Bujalance, la kordova instruisto.




José de Tapia Bujalance naskiĝis en la urbo Kordovo en la jaro 1896. Lia patro, Laureano de Tapia y Telles, estis militisto, respublikano kaj unu el la ĉefaj masonistoj en Kordovo. Elisa Bujalance, la patrino, kontraŭe estis pia sinjorino kaj tradicia dom-mastrino. La patro de nia hodiaŭa ĉefrolulo lernis esperanton kaj pro sia esperantisteco, li instigis al siaj 3 gefiloj (José, Laura kaj Rafael) sekvi la kursojn de esperanto organizataj de la pioniro de la movado en Kordovo, la franca ingeniero Paul Linares en la Publika Gimnazio de Kordovo ekde la jaro 1909. Laureano de Tapia eĉ estis secretario de la Esperanto-Grupo en Kordovo kie ankaŭ Laura de Tapia, filino de Laureano kaj do fratino de José, agadis kiel bibliotekistino.

José de Tapia sekvis studojn por fariĝi instruisto en Kordovo, li finis en la jaro 1913 kaj en tiu jaro mem li okupis sian unuan profesian postenon en la nord-kordova vilaĝeto *Pueblonuevo del Terrible*, mineja urbo kie lia frato Rafael laboris kiel kontisto por la gravega franca min-kompanio *Sociedad Minero-Metalúrgica de Peñarroya.* Tiu entrepreno mem estis la posedanto de la lernejo por infanoj de tiu vilaĝo, do ili dungis la novan instruiston por ekfunkciigi la lernejon.

Dum-matene José de Tapia instruis al la filoj de la ministoj kaj dum-vespere li decidis organizi kursojn por la laboristoj mem. Al ĉi

tiuj li instruis ĉefe matematikojn kaj sciencojn. Hazarde, dum unu el tiuj vesperaj klasoj, la instruisto José de Tapia aŭskultis al du laboristoj ĉeestantaj en la lernejo konversacii per la internacia lingvo Esperanto. Li tuj prezentis sin mem al ambaŭ laboristoj kiel esperanto-parolanto, membro de Universala Esperanto-Asocio kaj eĉ delegito pri instruado en Kordovo.

Tiuj du ministoj sciigis al la profesoro, ke malgranda grupeto de laboristoj, ĉefe tiuj membroj de la anarkisma sindikato, vere interesiĝis pri la nova lingvo kies celo estis unuigi la tutan homaron. En tiu momento José de Tapia proponis al la laboristoj organizi vesperan kurson de esperanto en la lernejo sub sia gvidado. La organizado kaj disvolviĝo de tiu kurso meritas propran artikolon, kiun ni promesas eldoni post kelkaj numeroj en ĉi tiu revuo.



Minejoj kaj fand-fornoj en *Pueblonuevo del Terrible* (Kordovo) en la komenco de la 20-a jarcento.

Tamen, la laboro de José de Tapia kiel instruisto en la mineja nordo de la kordova provinco nur daŭriĝis unu jaro. La min-entrepreno, posedanto de la lernejo kaj dunginto de la instruisto, ne ŝatis la organizadon de tiu kurso kiu favorigis la solidarecon inter la laboristaro. Krome, li ankaŭ havis problemojn kun la loka pastro, José de Tapia estis liberpensulo kaj anarkisto, sed kiel direktoro de la lernejo li respondeciĝis ankaŭ pri la religia instruado de la gelernantoj. Laŭ siaj propraj vortoj, li akceptis la religian instruadon, se tio estis la deziro de la respondeculoj de la lernejo, tamen li neniel povis akcepti la

devigon agadi ankaŭ kiel profesoro pri religio. Do, la min-entrepreno decidis maldungi lin post tiu unua jaro da instruado en la lernejo de *Pueblonuevo del Terrible.* La anarkismaj esperantistoj helpis al la instruisto cele la kreon de nova lernejo por la filoj de la ministoj, ili eĉ luis sidejon, tamen, la premoj de la entrepreno rilate la novan projekton krei alternativan lernejon provokis la nuligon de tiu ideo.

En la jaro 1917 José de Tapia aprobis ekzamenon por labori kiel instruisto en naciaj lernejoj. Lia nova labor-loko estis Montoliú en Katalunio. En tiu nova lernejo José de Tapia kontaktis kun aliaj instruistoj kiuj apartenis al la grupo *Batec* ("kor-bato" en la kataluna lingvo. Ili apartenis al la pedagovia movado Freinet. Tie, José de Tapia, liberpensulo, anarkisto, esperantisto, celanta la instruon al la lernantaro de la libereco, la justico kaj la amo ĝuis la eblon instrui laŭ siaj propraj pensoj.



Dum tiuj jaroj la instruistoj kiuj favorigis la pedagogian sistemon *Freinet* ofte instruis ĉe la kamparo por faciligi la komprenon de la naturaj sciencoj.

En Katalunio José de Tapia aliĝis al la Anarkisma Federacio kaj li kunlaboris kun la liberacana revuo *"La Estrella Blanca"*, gazeto tute favora al la ideo adopti internacian lingvon, kvankam sur ties paĝoj estis pli ofte vidi artikolojn favore al Ido ol al Esperanto. Kiam komenciĝis la civitana milito en la jaro 1936 li partoprenis, ene de la

anarkisma milico, en la atako al la kazerno de Sankta Andreo, tie troviĝis la plej granda kaj abunda municiejo en Barcelono.

En la jaro 1938 li aliĝis al la respublikana armeo kaj luktis en la Pirinea Montaro. Ĝuste en la fino de la milito (1939) li ekziliiĝis kun sia familia en Francio. Unuamomente la francaj aŭtoritatuloj kunigis lin, kun amaso da respublikanoj, en la koncentrejoj de Argelés, Barcarés kaj poste en Saint Cyprien. Dum la nazia okupo de Francio li laboris en la arbaro kiel arbo-hakisto kaj karbo-faristo kaj li eĉ kunlaboris apud la francaj kontraŭ-naziaj partisanoj.



La instruisto José de Tapia kaj lernantaro en la kurso 1935/1936

Kiam la dua mond-milito finiĝis li rekontaktis kun alia Freinet-instruisto kaj bona amiko Patricio Redondo, kiu sukcese ekziliiĝis en Meksikion. Li proponis al José de Tapia iri ankaŭ en tiun landon kaj li tuj akceptis. Do, en la jaro 1948 José de Tapia iris en Centr-Amerikon. Unuamomente, li ne laboris kiel instruisto, sed kiel kontisto kaj ĵurnalisto. En la jaro 1951 li verkis la libron *"Amenidades e Intimidades"* kaj kunlaboris ofte kun la *Consejo Español de la Paz*, hispana asocio en Meksikio, starigita de respublikanaj ekziliintoj, kies celo estis atingi pacon inter hispanoj kaj favorigi la revenon en Hispanion de ĉiuj ekziliintoj.

José de Tapia, kunlabore kun Patricio, laboris kiel instruisto en la regiono *Tuxtlas* kaj poste en la urbo Meksiko. Tie li kontaktis kun la

Nacia Instituto por Indiĝenoj kaj baldaŭ li deĵoris por havigi instruadon al mazatekanoj en la regino *Temazcal.* José de Tapia proponis al tiu instituto la instruadon pere de la sistemo Freinet, tiel la infanoj povus lerni per naturaj elementoj kaj per kajeroj eldonitaj de la propra instruisto kunlabore kun la gelernantoj en ilia propra lingvo, krom la hispana, kio sendube faciligus la lernadon al la mazatekaj infanoj.



José de Tapia kaj mazatekaj virinoj en Meksikio


En la jaro 1959 forpasis Catalina, la edzino de José de Tapia, kiu jam akompanis lin eĉ en lia unua lernejo en *Pueblonuevo del Terrible.* Tiam li decidis reveni en Francion kaj tiel loĝi apud siajn filojn. Tamen, post unu jaro da restado en Eŭropo, li komprenis, ke lia revo ĉiam estis labori kiel rura instruisto, do li revenis en Meksikion. En nova lernejo li konis instruistinon, Graciela Sánchez -*Chela*- kiu poste fariĝus ŝia edzino. Ambaŭ fondis la lernejon "Bartolomé Cossío" en Tlalpan, kie li laboris ĝis la fino de sia kariero kiel instruisto, jam 92-jaraĝa.

En 1977 José de Tapia atingis la meksikan civitanecon kaj kune kun *Chela*, li vizitis Hispanion kiam, post la forpaso de la ĝeneralo Franco, la demokratia sistemo revenis en Hispanion. José de Tapia Bujalance forpasis en la jaro 1989, antaŭ kelkaj jaroj la Kordova Urbodomo aprobis la nomigon de strato per la nomo *"Maestro José de*


Tapia", omaĝe al tiu aktiva kaj ĝisosta instruisto kiu elkovris la internacian lingvon dum sia juneco.



José de Tapia kaj lia edzino *Chela.*



La instruisto kaj la lernantaro.



Glorieta Maestro José de Tapia en Kordovo.

FLAMENKO

Lole kaj Manuel

Nuntempe temas pri ofta afero aŭdi kaj legi pri la nova flamenko aŭ pri la tiel nomata, flamenko-fuzio. Tio estas, la kunfandiĝo de la pura flamenka arto kaj aliaj muzik-stiloj, kiel ĵazo, roko aŭ pop-muziko. Oni povas diri, ke ĉe estas pli facile trovi hodiaŭ flamenkajn kantistojn kiuj estas pli proksimaj al ĉi tiuj muzik-stiloj ol al tiu antikva flamenko nomita "*profunda kantado*". Tamen, antaŭ kelkaj jardekoj, tiu nova flamenko tute ne ekzistis kaj eĉ la unuaj flamenkaj kantistoj kiuj kuraĝis fari tion estis forte kritikataj de la tiel nomataj flamenkaj puristoj. Tio verdire, okazas ne nur en la flamenka arto, sed ankaŭ en ĉiuj muzik-stiloj kiam iu decidis enkonduki novaĵojn.



Lole kaj Manuel

Sendube Manuel Molina kaj Dolores Montoya, pli konataj kiel *Lole y Manuel*, estis la unuaj flamenkaj artistoj kiuj kuraĝis kunfandi la flamenkon kun aliaj muzik-stiloj. Ambaŭ naskiĝis ĉe familioj tute flamenkaj, sed kiel asertis Manuel mem ... *Kompreneble mi ne gitar-ludas kiel mia patro, nek Lole kantas kiel sia patrino, ĉar neniu el ili aŭskultis neniam Janis Joplin aŭ Jimi Hendrix, ankaŭ ne la muzikon de Beatles, ni decidis renovigi nian propran muzikon kaj tiamaniere eltrovi nin mem.*

La tekstoj en la kantaĵoj de Lole kaj Manuel ne temas pri la tradiciaj sociaj aŭ amaj problemoj, oftaj temoj en la flamenka arto. Ili kantas la vivon kaj ĉefe la esencon de la andaluzia popolo. Kiel duopo ili komencis ludi en la jaro 1973, kvankam unuamomente ĉiuj muzik-

kompanioj rifuzis la proponon surbendigi diskon, por la fakto, ke ĉiuj opiniis, ke tiu paro havus nenian estontecon en la muzika mondo.

Malgraŭ tio, la unua disko de Lole kaj Manuel aperis en la jaro 1975, temis pri *"Nuevo Día"* (Nova Tago), kaj kvankam nenian reklam-kampanion oni organizis, la disko estis tre bone akceptata en la merkato kaj fine ĝi estis furora sukceso. En la jaro 1976 ili surbendigis la diskon *"Pasaje del Agua"* (Pasejo de l'akvo), ene de ĝi aperas arabaj ritmoj, kvankam ankaŭ oni povas agnoski ankaŭ ritmojn pure flamenkaj, tiel tangoj, alegrioj, bulerioj... Nur unu jaro poste, en 1977, aperas la disko *"Lole y Manuel"*, tiam ili decidis halti tiun frenezan karieron kaj ili komencis tri-jaran paŭzon, koincide al la naskiĝo de Alba, filino de Lole kaj Manuel.

En la jaro 1980 aperas *"Al Alba con Alegria"* omaĝe al Alba, la eta infano de la paro. En 1984 ili surbendigis novan diskon *"Casta"* (Kasto), post ĉi tiu laboro ili decidis fini sian muzikan karieron kaj ankaŭ sian am-rilaton. En la jaro 1992 ili decidis rekomenci sian muzikan karieron per disko surbendigita apud la Londona Simfonia Orkestro, temas pri *"Lole y Manuel cantan a Manuel de Falla"*, tamen la disko ne sukcesis. Du finaj laboroj *"Alba Molina"* en la jaro 1994 kaj *"Una Voz y Una Guitarra"* (Voĉo kaj Gitaro) metis finan punkton al la komuna muzika kariero de Lole kaj Manuel.



"Nuevo Día" la unua disko de Lole kaj Manuel.

Lole daŭrigis sian laboron kiel solista kantisto, bedaŭrinde Manuel Molina forpasis 67-jaraĝa en la jaro 2015. Kvankam unuamomente, la flamenkaj puristoj kritikis kian ajn muzikan renovigon ĉe la flamenka arto, Lole kaj Manuel verkis unu el la plej belajn paĝojn en la historio de tiu antikva arto. Ili malfermis novan vojon, hodiaŭ ĉies akceptata: naturo, suno, lumo, koloro... estis oftaj elementoj en

en siaj kantoj. Tamen, la plej granda sukceso de Lole kaj Manuel estis la fakto, ke ili atingis malfermi la pordojn de la flamenka arto al multaj homoj, ĉefe al gejunuloj.

Ĉio estas kolor'

Ĉiuj ja siajn dolorojn kantas
kaj komprenon tuj petas,
tial kiu kantas sian felicon
la suferon ne komprenas.

Sinjor' de la senlimaj spacoj
la pacon havas Vi sur Viaj manoj.
Versu ĝin mia Di', mi Vin petas
kaj instruu al miaj fratoj kio estas amo.

Je Dio mi tute ne komprenas
tion kio okazas en la mondo,
la kardo ĉiam laŭte krianta
kaj ĉiam en silento la floro.

Floro kriu !
Silentu kardo!
Tiu, kiu mia malamiko estas,
farigu tuj mia frato.

Ni iru tra tiu vojo,
tiam novan lumon ni trovos.
Tiu lumo kusanta sur la tero
sed estingita de ni, la homoj.

Sinjor' de la senlimaj spacoj
la pacon havas Vi sur Viaj manoj.
Versu ĝin mia Di', mi Vin petas
kaj instruu al miaj fratoj kio estas amo.

Kaj montri de la vivo la belecon
kaj esti konsolo de ĉiaj vundoj,
kaj ami per blanka am' la tutan teron,
kaj serĉi Sinjor' la pacon kaj malami la militojn.

En tiu ĝardeno ĵus eniris
Kvar homoj por disputi.

Sen-kompate ili for-prenis
la rozon de mi amata,
sed poste ili ĝin disdegnis.

Kiu povus pruvi, ke Kristo
cigano ne estis,
aŭ ke Li ne kapablis kanti.

La ploroj en via balkono,
la ploroj en via balkono,
plore celas vidi vin, mi ja scias.

El la disko *"Nuevo Día" (1975).*



21-a Andaluzia Kongreso de Esperanto


Okazonta en Malago de la 3-a ĝis la 5-a de majo 2019, samtempe al la Hispana kaj al la Internacia Fervojista Kongresoj de Esperanto.

Tiel, ni daŭrigas la tradicion de la andaluziaj kongresoj, post la sukcesa renkontiĝo en Antekero kaj samtempe, ni ofertas al andaluzoj la ŝancon partopreni en la internacia etoso de IFEF (fervojistoj) kaj HEK (Hispana Kongreso) kaj krome ni havas la eblon prezenti tie erojn de la esperanta andaluzia vivo.

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Or-Turo en Sevilo

Alejandro Burgos Escalante. Teba (Malago)



La fama sevila turo, kiu ĝuas grandan prestiĝon en la tradicio kaj en la legendo, konservas la memoron de siaj maŭraj formoj.

Ĝi ricevas la adjektivon “ora”, ĉar el tiu koloro estis la haroj de treege bela virino, al kiu la reĝo Petro enŝlosis en la turo profitante la foreston de ŝia edzo, kiu estis en milito. La damo de la haroj el oro enfermis sin mem en monaĥejon, atendante la revenon de sia edzo.

Okazis, ke unu tago la reĝo vidis la damon de orharoj, kies harvualo ne povis kaŝi sian vizaĝon, kaj la monarko enamiĝis de ŝi. Oni diris, ke Petro estis viro, kiu atingis ĉion kion li deziris. Poste la reĝo elirigis perforte al la monaĥino kaj tuj enmentis ŝin en turon.

La damo neniam pripensis sinmortigon, sed ŝi ja pripensis oferi sian belecon. Unue, ŝi tondis sian belegan hararon, kies koloro estis ora, kiun avidis la monarĥo. Due li pensis ĵeti al si mem flakonon, kiu enhavis sulfatan acidon.

La damo estis tiel bone enŝlosita en la turo, ke estis neeble akiri la venenon, kaj kiam ŝi mendis al virino, kiu gardis ŝin, tiu ulino rakontis al Petro pri tio. La monarko koleriĝis pro la agado de la forrabita damo. Li perfortis la kompatindan sendefendan malliberulinon, kaj ŝi reiris en la monaĥejon, ne por atendi ŝian edzon,

sed simple por atendi sian propran morton. La morto alvenis rapide kaj ĝi estis pli homa ol tiu de la reĝo Petro.

Ŝia edzo sukcesis vidi ŝin nek viva nek morta. Li avidis la venĝon pro la sufero de lia edzino, do li parolis kun la frato de la reĝo kaj malamiko de li, "*La Bastardulo*". Ili du (Petro kaj la Bastardulo) interluktadis tiutempe.

La fino de la reĝo Petro estis katastrofa, kiel ni ĉiuj scias.




21º Congreso Andaluz de Esperanto

Tendrá lugar del 3 al 5 de mayo de 2019 en Málaga, coincidiendo con los Congresos Español e Internacional Ferroviario de Esperanto.

De este modo continuamos con la tradición de los Congresos Andaluces de Esperanto, después del éxito del encuentro organizado en Antequera y, al mismo tiempo, ofrecemos la posibilidad a los esperantistas andaluces de participar en otros encuentros esperantistas de carácter internacional, como el Congreso Español, organizado por la Federación Española de Esperanto y el Internacional Ferroviario, organizado por la Federación Internacional de Ferroviarios Esperantistas.

Nuda Krucvortenigmo




HORIZONTALE

A. En la kamboĝaj aŭtomobiloj.
B. Inverse kaj akuzative, ne-difina pronomo reprezentanta iun objekton.
C. Malmola kovrilo, kiuj antikvaj militantoj portis por defendi sin.
Ĉ. Eble, la plej populara sporto.
D. Inverse, malĝusta opinio.
E. Inverse, ludkarto kaj roma monero.
F. Ĝi povas egali al nulo.

VERTIKALE


1. En la francaj aŭtomobiloj.
2. Piedvesto.
3. En ĥemiaj kunmetaĵoj, mallongigo de gaso formanta la 4/5 el la teratmosfero.
4. Manĝaĵo konsistanta el spicita viando kaj enŝovita en intestojn.
5. Adjektive, filaro.
6. Sen la lasta vokalo, grasa likvo.
7. Ronda vokalo.

Rebuso



Kie Vi somerumos ?: _____

Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.



Solvo al la pasintnumera Rebuso.

Amerika sen-dependa ŝtato: SURINAMO.

(Sur la bildo aperis la simbolo de la amo sur virino, do:

SUR IN' AMO = Surinamo)


Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:



esperanto14@ono.com

HUMURO







La numero 109-a de nia revuo aperos dum la monato decembro 2018. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch
Juan García del Río

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
www.esperanto-andalucia.info
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodriguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



21-a Andaluzia Kongreso de Esperanto *3-a / 5-a majo*

78-a Hispana Kongreso de Esperanto *1-a / 5-a majo*

71-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

3-a / 9-a majo

M A L A G O (Hispanio)